



Facila Vento

27-a de novembro 2022, numero 5

Redaktas Dmitrij Ševčenko kaj Anna Striganova

Oficiala Fermo de la 3-a Virtuala Kongreso de Esperanto

Oficiala Fermo de la 3-a Virtuala Kongreso de Esperanto kaj Retoso okazis la 27-an de novembro.

Ĝin gvidis Fernando Maia, la 1-a Vicprezidanto de UEA. Li emfazis, ke la VK havas inter la ĉefaj celoj “Kunigi la landojn, kunigi homojn...”



La 3-an Virtualan Kongreson de Esperanto partoprenis homoj el preskaŭ 100 landoj. Bonega novaĵo. UEA superis en 2022 la membronombron de 2021, pri tio oficiale anoncis Fernando Maia.


Subtenu nian agadon!
Aliĝu al UEA kaj TEJO por 2023:
<https://uea.org/alighoj/alighilo>



Albert Stalin Garrido, la Prezidanto de TEJO, rakontis pri la ĉi-jara Retoso, kiu estis sukcese organizita kune kun TEJO kaj UEA. Pli ol 50 programeroj estis dum 4 tagoj. Li ankaŭ anoncis, ke TEJO oficiale superis 1000 individuajn membrojn.



Snehaĝa Venkatesh parolis pri la scienca programo por junuloj, kadre de la Retoso.



Amri Wandel, 2-a Vicprezidanto de UEA, respondulo pri la Scienca kaj Faka Agado de UEA rakontis pri 7 sukcese okazintaj IKU-prelegoj kaj 7 prelegoj, kadre de la Scienca Kafejo. La prelegoj estis averaĝe pli kvalite aranĝitaj, ol en Montreala Universala Kongreso, ĉar kelkaj el ili estis refaritaj kaj pli vaste oni povis vidi kaj aŭskulti ilin tra la mondo. Li ankaŭ substrekkis



pri la sukceso de la platformo Retevent. Registraĵoj de la sciencaj programeroj estos alŝutitaj al UEAViva kaj estos spekteblaj ĉe jutubo. Li ankaŭ invitis al la IKU-sesio, kiu okazos kadre de la 108-a Universala Kongreso en Torino, Italio, kaj estos hibrida. Partoprenu, se vi interesiĝis pri la scienco. Li ankaŭ parolis pri la Faka Agado. Dum la VK okazis du sesioj de la Faka Forumo.

Fernando Maia dankis la teknikajn kunlaborantojn, i.a. ankaŭ tiujn, kiuj filmis kaj muntis la registraĵojn. Li nomis VK la "vitrino" de Esperanto kaj grava investo al la futuro de nia lingvo.

Parolis ankaŭ Petro Balaš, estro de la teamo E@I. Li rakontis pri la statistikoj de la VK kaj Retoso. Dum kvar tagoj okazis 371 programeroj. Kaj pri la venontjara Torina UK, kiun, kiel Konstanta Kongresa Teamo de UEA ankaŭ kunorganizos E@I. Retevent funkcios ĝis la 31-a decembro de 2022. Eblos re-spekti ĉiujn registritajn programerojn ĝis tiu dato.



Oni substrekiis ankaŭ la elstaran agadon de Katalin Kováts. Dum la VK okazis tre sukcesa KER-ekzamena sesio. Ŝi laboris ekde la frua mateno ĝis la malfrua vespero en la diversaj horzonoj.


Partoprenu Belartaj Konkursoj de UEA: <https://uea.org/gk/1063a1>

La absoluta limdato por ricevo de konkursaĵoj estas la 31-a de marto 2023.



Jérémie Sabiyumva rakontis pri la 8-a Afrika Kongreso de Esperanto, kore bonvenigante partopreni kaj

subteni. Jam partoprenantoj el 3 kontinentoj aliĝis. Bonvenon! Tio estas granda subteno al la Afrika agado. Li ankaŭ diris, ke estas organizata karavano al la 8-a AK el Brazilo.



Bv. subteni tiujn, kiuj deziras, sed ne povas veni al la 8-a AK pro la monaj kialoj. Kontribuu al la fondaĵo "Afriko" de UEA. Kun la noto "Por la 8-a AK":
<https://uea.org/alighoj/donacoj>



Kadre de la Solena Fermo estis montrita filmeto, kie kantis Kjara, kaj kelkaj filmetoj, prezentantaj Torinon, la venontjaran urbon de la UK.

Fine de la fermo tradicie estis plenumita himno *La Espero*. Ĉi-foje en la originala nekutima gitara plenumo.

La 3-a VK kaj Retoso 2022 estis oficiale fermitaj! Ĝis baldaŭ, karaj!

Statistiko

Al la 3-a Virtuala Kongreso aliĝis 1469 personoj el 98 landoj (ĉ. 1000 ensalutis ene de 4 tagoj, tamen la aliaj ankaŭ povas poste eniri la sistemon por re-spekti la programerojn). Al Retoso 2022 aliĝis 295 personoj el 61 landoj.

Bonvolu helpi plibonigi la VK-jn: plenigu la demandaron:
<https://mallonge.net/VK2022>

Rezultoj de la Oratoraj konkursoj:

Ĉi-jare la Komisiono por oratoraj konkursoj de UEA ne atribuas premiojn, sed kore laŭdas la kuraĝon de la kandidatoj, kiuj sin proponis.



Esperanto kaj la angla por interkultura komunikado kadre de la nova magistra programo pri interlingvistiko en AMU

Esperanto kaj la angla por interkultura komunikado kadre de la nova magistra programo pri interlingvistiko en AMU – titolis la prelego de Ilona Koutny sabate je la 18-a horo (UTC+1).

Post analizo kion bezonas la labormerkato kaj komparo de la angla kaj Esperanto laŭ diversaj kriterioj ŝi parolis pri la tradiciaj postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj de la Adam Mickiewicz Universitato (Poznano, Pollando) kiuj nun jam travivas sian 25-an jaron kaj akceptas studentojn el la tuta mondo. Alia bazo por la novaj magistras studoj en AMU estas la iam funkciantaj magistras studoj pri Esperanto en la Budapeŝta Eötvös-Universitato (HU).

La ĉina Universitato en Zaozhuang, kie ekde 2018 funkcias bakalaŭraj studoj pri esperanto, iniciatis la magistras studojn en AMU por ke iliaj studentoj povu daŭrigi siajn studojn. En 2019 la du universitatoj subskribis kunlabor-kontrakton en tiu celo, sed por la realiĝo gvidis longa vojo. AMU anoncis la novajn internaciajn magistras studojn en junio 2022. Fine nun povis starti la 2-jara magistra programo kiel specialigo kadre de studdirekto lingvistiko kaj informmastrumado.

En la programo de tiuj ĉi unikaj studoj (<https://kml.amu.edu.pl/en/interlinguistics/>) troviĝas i.e. lingvistikaj studobjektoj (tipologio, lingvopolitiko kaj lingvistika priskribo de Esperanto) kaj interkultura ko-

unikado (en Esperanto), krome studobjektoj de informmastrumado (en la angla).

La pioniraj studentoj ĵus alvenis en Poznano (iom malfrue pro la formalaĵoj). Surloke helpas al ili polaj studentoj. Prof. Rafał Witkowski, vicrektoro de AMU akceptis ilin varme en la rektora salono lunde kaj donis al ili donacojn.

Jam nun pripensu aliĝon en la sekva jaro!

Informoj:

<http://interl.amu.edu.pl/>; ikoutny@amu.edu.pl

Marco Lucchesi salutas la 3-an VK

Marco Lucchesi, membro de la Honora Patrona Komitato de UEA kaj antaŭa prezidanto de la Brazila Beletristika Akademio, salutas la 3-an Virtualan Kongreson de Esperanto. La saluto estis publikigita en la tvitera konto de la verkisto: <https://mallonge.net/tf>



Marco Lucchesi
@marcolucbr

Ao congresso de esperanto, aos que se empenham na construção da paz.



Vicrektoro prof. Witkowski, grupo de ĉinaj studentoj, meze prof. Ilona Koutny (gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj), du polaj studentinoj, en la dua vico tri instruistoj de la programo



Edukaj projektoj, subtenataj de EU- programo Erasmus+



Sabate je 14:00 UTC okazis dum la VK prezento de Peter Baláž (kunordiganto de E@I) pri “La plej novaj projektoj kaj agadoj de E@I”. Dum ĝi li prezentis diversajn freŝajn aktivaĵojn, kiuj helpas kaj utilas (ankaŭ) por Esperanto.

Tre esperdonaj estas projektoj, kiujn subtenas Eŭropa Unio pere de sia programo Erasmus+. Jen ni mencias almenaŭ kelkajn, pri kiuj indas esti informita:

★ **www.polski.info** – retejo por lerni la polan lingvon (ekzistas ankaŭ EO-versio de la retejo)

★ **www.slovene.eu** – retejo por lerni la slovakon lingvon per 16 lingvoj (ankaŭ pere de EO)

★ **www.deutsch.info** – retejo por lerni la germanan lingvon per 22 lingvoj (ankaŭ pere de EO)

★ **<https://reflections.eduskills.plus>** – retejo pri tutmonda edukado, ĉefe por instruistoj (mankas EO, serĉataj estas volontuloj por traduki ĝin)

★ **www.testu.eu** – estos senpaga, plurlingva retejo, kiu helpas krei diversajn kvizojn, testojn kaj ekzercojn (ĉefe por lingvolernado) tre facile kaj rapide. (Ekfunkcios printempe 2023.)



★ **www.vortoj.net** – Vortoj estas komputila ludo, uzanta danctapiŝojn. Ĝi estas refleksa ludo kombinanta saltadon kun lingvolernado. Per Vortoj vi praktikos lingvojn kaj iĝos pli certa pri literumado de la vortoj, havante amuziĝon ludante kun vi-

aj amikoj kaj kolegoj. (UEA estas partnero en tiu projekto. La ludo estos oficiale prezentita dum la UK 2023 en Torino, kie oni povos mem ludi ĝin.)

Jen, kiel videblas, indas (kaj eblas) utiligi EU-subtenon por praktikaj kaj buntaj projektoj, kiuj povas tre utili ankaŭ por EO-komunumo!

Pli da detaloj: www.ikso.net/projektoj

Informo de KuboF Hromoslav

Mi scias, ke dum mia prelego pri funkcia voĉa klavaro por Esperanto estis relative malmulta tempo kun instrukcioj kiel vi mem povas tuj instalii kaj funkciigi voĉan klavaron, do jen estas la instrukcioj en teksta formo 🗣

- 1) havu aparaton kun Android
- 2) instalu “Esperanta Parolrekono” – <https://mallonge.net/tt>
- 3) instalu “Kōnele” – <https://mallonge.net/tu>
- 4) al ambaŭ aplikaĵojn donu bezonatan permeson, ki-
am ili postulas ĝin
- 5) agordu Konele por uzi “Esperanto parolrekona servo”
- 6) agordu en Android “metodo de eniro” por akcepti
voĉan klavaron
- 7) eble vi bezonos restartigi vian aparaton
- 8) poste en la klavaro sufiĉas klaki la ikonon de mikro-
fono, iomete atendi kaj paroli – jen, espereble ĉio 😊

Se tio estus defia por vi, respondu al mi, aŭ skribu en la grupo de la teamo Parolteknologio kaj ni helpos vin: <https://t.me/+SPnRKQ4KS1M0MjQ0>

Estonteco:

1) ni planas ankaŭ voĉan klavaron por iOS, sed dume ni ne havas programiston por tio – se vi kapablas fari tion, kontaktu nin

2) ni planas ankaŭ facile uzeblan komputilan programon por transskribado de voĉo al teksto, sed dume ni ne havas por tio disponeblan programiston – se vi kapablas fari tion, kontaktu nin!

